

La Esperantisto.

Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache. | Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Eldonata unu fojon en la monato de L. Zamenhof.

Kosto por 1/2 jaro (kune kun poŝta transsendo) 2 markoj 30 pfenigoj. (Por Rusujo — 1 rublo, por ĉiuj ceteraj landoj — 3 frankoj.) Anstataŭ mono oni povas sendi signojn de poŝto (de ĉia lando), sed en tia okazo oni devas sendi per 20% pli multe ol la kosto nominala. Anoncoj po 1 marko por 1/32 de la paĝo.

Ĉio tuŝanta la gazeton „La Esperantisto“ (kiel ekzemple leteroj, artikoloj, pago por la abonado k. e.) devas esti sendata al L. Zamenhof. (Adreso: Dr. L. Zamenhof à Varsovie, Russie.)

Oni povas aboni ankaŭ en la librejo de Heerdegen-Barbeck en Nurnbergo.

No. 5.

Nurnbergo, Majo 1891.

Jaro II.

Esperantistoj vastigantoj.

En la 5a numero 1890 de nia gazeto estis presita projekto fondi ligon de „Esperantistoj vastigantoj“. Laŭ la esenco de la projekto, kiu estas skribita tre logike kaj konvinke kaj kies relegon ni rekomendas al niaj amikoj, estus sufiĉe, se ĉiu esperantisto nur unu fojon en sia vivo farus ion por nia afero — kaj la regula rapida kreskado kaj ĉiufanka perfektigado de tiu ĉi afero estus jam sendubigita. Sed la malforta flanko de la projekto konsistas en tio, ke persono volonta fariĝi „vastiganto“ devis promesi ion, pri kio li ne povis antaŭe certe diri, ĉu li povos ĝin plenumi. Estus domago, se la bona projekto perdiĝus, ĉar ĝi povus eble efektive doni bonajn fruktojn sen grandaj oferoj de la flanko de ĉiu aparte. Tial ni reprenas nun la projekton kaj komencas ĝian efektividon. Sed por ke ĉiu povu facile enskribiĝi en la nombron de la vastigantoj, ne timante, ke li eble en okazo de malsukceso devos kontraŭvole rompi sian promeson, ni faras en la projekto la sekvantan ŝanĝon: anstataŭ „mi alportos 2 novajn vastigantojn“ ĉiu promesas: „mi penos alporti 2 novajn vastigantojn“. Sed por antaŭe eviti de l' alia flanko la cirkonstancon, ke multaj eble tute ne provos serĉi kaj simple diros, ke ili serĉis sed ne trovis, ĉiu vastiganto aldonas al sia promeso, ke se ĝis la promesita tempo li ne estos alportinta la 2 novajn vastigantojn, li sendados ĉiunomate pruvojn de lia laborado por nia afero, tiel longe ĝis la 2 personoj estos de li trovitaj. De tio ĉi rezultos: a) ke ĉio povos facile enskribiĝi, ne timante, ke la plenumo de la promeso estos por li malfacila aŭ neebla kaj devigos lin rompi sian vorton; b) kvankam en okazo de netrovado de novaj vastigantoj ĉiu ricevas por purigi sian honoron tre facilan rimedon, tamen la ripetata sendado de pruvoj kaj la memorado pri tiu ĉi sendado estos ne tute agrabla por la maldiligentuloj, kaj tial ĉiu, kiu nur povos, pli volonte penos unu fojon fari sian ŝuldon, ol eterne laboradi kaj sendadi pruvojn. (Ni supozas kompreneble, ke intence publike rompi sian vorton, se la plenumo de ĝi ne estas malfacila, neniu honesta homo volos.)

Tio ĉi estas la sola formo, sub kiu ni povas komenci la efektividon de la projekto de sinjorino L. Aliaj formoj post matura pripensado montris sin ne bonaj. Tiel ekzemple oni proponis al ni, ke la vastiganto, ne trovinta 2 novajn vastigantojn, pagu monan oferon por nia afero; kvankam tiu ĉi rimedo per si mem ŝajnas la plej praktika kaj utila (ĉar per rimedoj materialaj ni ĉion povos fari), tamen 1) tiu sama sumo por unuj estus tro granda kaj nealportebla kaj por aliaj pli riĉaj personoj ĝi estus tro sensignifa kaj igus ilin jam de

la komenco pli volonte pagi monon ol serĉi vastigantojn (kio estas por ni multe pli grave), — dum la ĉiunomate sendado de pruvoj de laborado estas egale facile farebla por ĉiuj kaj por ĉiuj egale malagrabla en komparo kun unufoja plenumo de sia promeso; 2) la kalkulado de mono elvokus baldaŭ de diversaj flankoj malkonfidon kaj metus nin en suspekton ĉe la registaroj.

Tiel komencante nun la efektividon de la projekto pri la vastigantoj, ni proponas al la amikoj de tiu ĉi projekto sendi al ni la sekvantan leteron:

Mi, subskribita, ellernis la lingvon internacian Esperanto kaj mi sankte promesas, ke mi penos kiel eble plej baldaŭ trovi 2 novajn personojn, kiuj ankaŭ ellernos la lingvon Esperanto kaj ankaŭ sendos per mi al la redakcio de la „Esperantisto“ tian saman leteron, kiel mi nun sendas. Se mi post 3 monatoj de hodiaŭ ne estos ankoraŭ trovinta tiajn 2 personojn, mi promesas en la fino de ĉiu prokrastita monato alsendi pruvon, ke mi konigis en tiu monato ne malpli ol 10 personojn kun la lingvo Esperanto*), kaj tion ĉi mi farados tiel longe, ĝis la diritaj 2 personoj estos de mi trovitaj.

Dato de forsendo:

Subskribo:

Mia adreso estas:

Mian nunan leteron mi sendas laŭ la propono de sinjoro _____ el la urbo _____

*) Se mi ne havos alian senduban pruvon, mi sendos al diversaj personoj ian gramatikon de la lingvo Esperanto kaj petos ilin sciigi min pri la ricevo, kaj ilia responda poŝta karto aŭ letero servos al mi kiel pruvo, ke mi ilin konigis kun la lingvo.

Por personoj, kiuj ne legis la artikolon de sinjorino L. en la No. 5 de la „Esperantisto“ de 1890, ni ripetos tie ĉi per kelkaj vortoj la esencon de la dirita projekto:

Plenumante la postulon de la projekto, ĉiu amiko de nia afero devos nur unu fojon en sia vivo oferi ne malfacilan laboron al nia afero, kaj tiam, se li poste eĉ tute forgesos

pri nia afero, li jam povas esti certa, ke li multe faris kaj lia laboro ne perdiĝis senfrukte. Se ĉiu amiko nur la solan fojon energie penas akurate plenumi sian promeson, tiam (supozante ke la plenumado daŭros plenajn 3 monatojn) de unu amiko post 3 monatoj fariĝos 3 amikoj, post 6 monatoj — 7 amikoj, post unu jaro — 31, post 2 jaroj — 512, kaj post 5 jaroj unu sola amiko turniĝos en preskaŭ 2000000!! Per tia maniero se nun enskribiĝos nur 50 vastigantoj, ni post 5 jaroj havos 100000000 da personoj ellernintaj la lingvon Esperanto!

Ni ne estas tiel optimistaj por kredi, ke tia grandega nombro estos efektive atingita en tia mallonga tempo. La nombro, kiun ni atingos efektive, estos multe pli malgranda; ĉar inter la granda amaso da enskribitaj homoj de di ersaj karakteroj troviĝos sendube multaj, kiuj plenumos sian promeson ne en la dezirita formo, ne akurate, aŭ facilanime tute ĝin ne plenumos, — kaj ĉiu aparta malakuratulo enportos grandegan malgrandigon en la atendatan nombron. Tamen se la nombro de niaj amikoj kreskos eĉ ne kun la mirega rapideco, kiun promesas la projekto akurate plenumata, — unu aferon ni povas diri: ke en ĉiu okazo la projekto sen grandaj oferoj de la flanko de ĉiu aparta amiko donos al ni konstantan kaj certigitan kreskadon de la nombro de niaj amikoj. Eĉ en okazo de absoluta malprospero ĝi malutilon alportos al ni nenian, dum se ĉiu el ni akurate ĝin plenumos, ĝi povas doni brilantan rezulton. Tial ni akceptas la projekton kaj varmege rekomendas ĝin al ĉiuj amikoj de nia afero.

La leganto jam vidis, ke laŭ la konstruo de la projekto la nombro de la vastigantoj en la unua tempo kreskos tre malrapide kaj poste ĉiam pli kaj pli rapidege kreskados en geometria progresio. Dum la nombro estos ankoraŭ tre malgranda, ni publikigados la „vastigantojn“ en nia gazeto; kiam la nombro komencos kreski pli multe, ni publikigados la vastigantojn en apartaj libroj. Por ke ĉiu povu vidi, kiu el la vastigantoj plenumas sian promeson kaj kiu ne, — ni ne sole presados eĉ ĉiu nova vastiganto, kiu kaj kiam lin varbis, sed ni presados ankaŭ ĉiumonate en aparta rubriko la nomojn de tiuj, kiuj ne trovis ankoraŭ novajn vastigantojn, sed alsendas por tio „pruvojn de laborado“.

La ekzistado de la „vastigantoj“ estas, por tiel diri, afero flanka. Ĝi postulas de ĉiu nur unufojan laboron, kaj farinte sian ŝuldon, ĉiu vastiganto eliras el la rondo de laborantoj. Tial la aliĝo al la vastigantoj ne devas iom haltigi nian ceteran laboradon, kiu devas iradi tiel same kiel antaŭe. Tute egale ĉu la vastigantaro ion donos aŭ ne, la veraj amikoj de nia afero sendube daŭrigados sian laboradon en ĉiuj manieroj, en kiuj ili povas.

Ankoraŭ en la pasinta jaro, tuj post la apero de la artikolo de sinjorino L., kelkaj amikoj alsendis al ni leteron pri sia aliĝo al la ligo de vastigantoj; sed tiam la vastigantaro ankoraŭ ne ekzistis, ĝi komencas sian ekzistadon nur de hodiaŭ, kaj tial ni petas la diritajn amikojn sendi al ni nun sian leteron denove, se ili ne ŝanĝis ankoraŭ sian decidon.

La aliĝon al la vastigantaro kaj la energian kaj elokventan serĉadon de novaj vastigantoj ni varmege rekomendas al niaj amikoj. Memoru amikoj, ke per la aliĝo Vi per unufoja laboro sen granda ofero alportos semon, kiu povas doni frukton milionoblan! Unu fojon en la vivo trovi 2 vastigantojn estas por ĉiu afero tre facila, kaj tamen kian miregan gravegan signifon ĝi povas havi, se ĉiu el ni akurate faros tiun ĉi malgrandan faron! Nenie preciza akurateco povas havi tian grandan signifon, kiel tie ĉi. Tial ni turnas nin al ĉiuj amikoj de nia afero, estantaj kaj estontaj: ĉu Vi en alia maniero volos laboradi por nia afero aŭ ne, — antaŭ ĉio aliĝu al la vastigantoj, kaj antaŭ ol V, faras ian alian

paŝon, uzu Vian tutan penon kaj tutan energion por eble plej rapide kaj akurate plenumi Vian promeson de vastiganto. Elokvente memorigu al Viaj varbatoj kaj ili de sia flanko memorigu al la siaj, ke ni petas de ĉiu nur unufojan facile fareblan laboron kaj ke se ĉiu tiun ĉi solan fojon estos energia kaj akurata, ni vidos en la plej mallonga tempo la brilantan efektiviĝon de la plej bela revo de l' homaro!

La eldonanto de tiu ĉi gazeto faras nun la komencon kaj enskribas sub No. 1 sian nomon en la nomaron de la „Esperantistoj-vastigantoj“. Kiu volas sekvi nian ekzemplon?

Rimarko.

La supre donita artikolo pri la „Esperantistoj-vastiganto“ estis preta eĉ ni jam antaŭ kelkaj monatoj; ni tamen longe ne povis decidiĝi ĝin presi, ĉar ni sentis, ke la rimedo kun la vastigantoj estas ambaŭflanke tranĉanta glavo, kiu en okazo de sukceso povas certigi baldaŭan venkon al nia afero, sed en okazo de malsukceso povas turni la tranĉantan flankon kontraŭ la afero mem. Dezirante konsiligi en tiu ĉi afero kun niaj amikoj, ni presis nun la artikolon en tiu sama formo kaj vorto laŭ vorto en tiuj samaj esprimoj, kiel ĝi estis skribita de ni antaŭ kelkaj monatoj, kaj ni petas ĉiun nian amikon skribi al ni, ĉu li aprobas la projekton kaj ĉu li konsentos post 2 monatoj esti enskribita en la nomaron de la vastigantoj. Se post 2 monatoj el la ricevataj opinioj montriĝos, ke la plej granda kaj la plej sperta parto de niaj amikoj estas por la projekto kaj ke ni povas esperi de ĝi sukceson, tiam ni, resendinte la legantojn al la artikolo en la nuna numero, simple sciigos, ke la projekto estas akceptita kaj ke ni komencas la enskribadon de vastigantoj; sed se montriĝos, ke la projekto ne trovas resonon, tiam ni post 2 monatoj sciigos, ke la projekto estas forĵetita.

Artikoletoj.

En la rubriko de la gazetoj, kiuj en la lasta tempo parolis pri nia afero, oni vidos, ke du pecoj el nia gazeto (la „Fingra kalendaro“ kaj „La deveno de la virino“) estas represitaj en kelkaj gazetoj, kiuj ne forĝosis aldoni, ke ĝi estas tradukita el la lingvo internacia Esperanto. La 2 pecoj estas la unuaj verketoj tradukitaj el nia lingvo en lingvojn naciajn. Tiuj ĉi tradukoj havas por ni tre gravan signifon, ĉar ili ne sole donas la okazon paroli en la gazetoj pri nia afero, sed ili altigas nian aferon kaj literaturon en la okuloj de la publiko. Tiaj tradukoj eĉ de la plej indiferentaj gazetoj estas volonte akceptataj (en ilia propra intereso) kaj alportas pli grandan utilon kaj pli grandan nomon al nia afero ol multaj nelerte skribitaj kaj ne akceptataj artikoloj kun sekaj laŭdoj de nia afero. Tio ĉi povas servi kiel plenigo al nia artikolo en No. 3 kaj montras ankoraŭ unu fojon, kiel multaj kaj diversaj estas la vojoj, per kiuj ni povas paroli en la gazetoj pri nia afero. Estus tre bone, se eble plej ofte kaj en eble plej multaj gazetoj aperu tiaj tradukoj el nia literaturo. Bedaŭrinde nia juna literaturo estas ankoraŭ tro malriĉa je originalaj verkoj aŭ verketoj; tial ni petas niajn amikojn, ke ili pli ofte sendu al ni interesajn originalajn verketojn, kiuj povus ne sole pliiinteresigi la enhavon de nia gazeto mem, sed igi ankaŭ la aliajn gazetojn konatigi siajn legantojn kun nia literaturo kaj sekve ankaŭ kun nia afero. Eĉ verketoj aŭ pecoj ne originalaj povas ofte alporti tian saman utilon; ĉar se ili estas interesaj kaj ne konataj al la vasta publiko, diversaj gazetoj ankaŭ pli volonte tradukos ilin el nia gazeto, ol el ilia nekonata originalo.

Ni turnas ankaŭ la atenton de niaj amikoj sur la No. 3 de la gazeto „Der Stereotypeur“ (vidu en la lasta numero de nia gazeto), en kiu de la plumo de sinjoro Chr. Schmidt estas donita artikolo, kiu ekster la klarigo de la esenco de nia afero donis ankaŭ la gramatikon de nia lingvo kaj parafrakon kun ekzercoj (kun la traduko de la vortoj sub tiu ĉi paragrafo) kaj promesis doni ankaŭ pluajn paragrafojn kun ekzercoj. Per tia maniero la legantoj de la „Stereotypeur“ (bedaŭrinde tiu ĉi gazeto eliras nur unu fojon en la monato) iom post iom, nerimarkeble, sen laboro kaj sen aĉetado de libroj konatiĝos kun nia lingvo. Estus tre bone, se niaj amikoj povus igi ankaŭ aliajn gazetojn oferi al ni en sia folio ian anguleton, kie ni povus konstante donadi senpagan sisteman popularan instruadon pri nia lingvo.

Sed, ni ne ĉesos ĝin ripetadi, antaŭ ĉio estas necese, ke ni persone serĉadu ĉiam novajn amikojn aktivajn, kiuj ne sole aprobas, sed ankaŭ ion faras; ĉar por esti sukcesa, nia laborado devas esti dividita inter eble plej multe da manoj. Persono, kiu mem nenion farante ĉiam kontentigas sin nur je tio, ke li diras „tio al mi plaĉas kaj tio al mi ne plaĉas“, — tiu ne povas sin nomi amiko de nia afero.

Konstanta kredito.

Ofte la amikoj petas nin, ke ni sendu al ili tiun aŭ alian verkon, kiam ĝi eliros, aŭ ke ni sendu al ili ĉion, kio povas ilin interesi, aŭ simple ĉiun nove elirintan verkon. Memoradi kaj plenumadi tiajn malegalajn petojn, ofte tre nedifinitajn, estas por ni tre malfacile. Dezirante tamen doni al niaj amikoj la eblon havi ĉiun novan verkon sen bezono antaŭe ripete demandadi kaj skribadi pri ĝi kaj sendadi monon por ĉiu verko aparte, ni enkondukas nun por la amikoj de nia literaturo la sekvantan ordon: por la personoj, kiuj volas ricevi ĉiun novan verkon, ni aranĝas konstantan krediton. Persono, deziranta havi tian konstantan krediton, devas sendi al ni unu rublon kaj peti enskribi lin en la libron de la konstantaj ricevantoj; al la personoj, enskribitaj en tiu ĉi libro ni sendos ĉiun nove elirintan verkon tuj post ĝia eliro, aŭ pli vere — tuj kiam ni ricevos ĝin de ĝia aŭtoro aŭ eldonanto, kaj la koston de la verko ni dealkulos de la rublo alsendita al ni. Kiam la alsendita rublo per tia maniero estos jam tute eluzita, ni sendos al la kreditano kalkulon kaj memorigon pri alsendo de nova sumo da mono por subteni la krediton.

(El la rusa poeto Nadson.)

Ne diru: „li mortis“. Li estas vivanta!
Se oni detruis l' altaron — la fajro ja restis flamanta;
Se oni deŝiris la rozon — do ĉiam ankoraŭ ĝi floras;
Se l' harpo eĉ estas rompita — l' akordo ankoraŭ do ploras.

S. Ŝatunovski.

La batalo de l' vivo.

Rakonto de Charles Dickens.
(Daŭrigo.)

„Mi diris al Grace, kara Marion“, li diris, „ke mi donas vin sub ŝian gardon, ke mi forirante konfidas al ŝi vin kiel mian plej karan juvelon. Kaj kiam mi revenos kaj vin repostulos, mia plej amata, kaj antaŭ ni staros la bela estonteco de nia edza vivo, tiam ĝi estu unu el niaj plej bonaj plezuroj meditadi, kiel ni povas fari Grace'on feliĉa, antaŭplenumadi ŝiajn dezirojn, montri al ŝi nian amon kaj dankecon kaj ion repagi al ŝi de la ŝuldo, kiun ŝi metis sur nin.“

La pli juna fratino metis unu manon en la lian kaj per la dua ŝi tenis ĉirkaŭprenite sian fratinnon. Ŝi rigardadis en la trankvile gajajn okulojn de sia fratino per rigardo, en kiu estis miksitaj amo, admiro, doloro kaj preskaŭ adoro. Ŝi rigardadis la vizaĝon de la fratino, kiel se ĝi estus la vizaĝo de ĉiela anĝelo. Kaj kun gaja, feliĉa trankvileco tiu ĉi vizaĝo rigardadis ŝin kaj ŝian amanton.

„Kaj kiam la tempo venos, se ĝi iam devas veni“, diris Alfred — „mi miras, ke ĝi ankoraŭ ne venis, sed Grace scias tion ĉi la plej bone, kaj Grace estas ĉiam prava — la tempo, kiam ŝi bezonos koron de amiko, al kiu ŝi povus sin konfidi, kiel fidelaj ni tiam estos, Marion, kaj kiel ni ĝojos, ke nia bona fratino amas kaj estas amata, kiel ŝi meritas!“

„Ĉiam ankoraŭ la pli juna fratino rigardadis al ŝi en la okulojn kaj ne deturnadis sin eĉ al li. Kaj ĉiam ankoraŭ ripozadis tiuj ĉi fidelaj okuloj kun gaja feliĉa trankvileco sur ŝi kaj ŝia amanto.“

„Kaj kiam ĉio tio ĉi estos pasinta kaj ni estos maljunaj kaj vivos en malvasta komuneco kaj ofte parolados pri la malnovaj tempoj“, diris Alfred, „tiam tio ĉi antaŭ ĉio devas esti nia tempo plej amata — precipe tiu ĉi tago; kaj tiam ni rakontados al ni, kion ĉe la disiĝo ni pensis kaj sentis kaj esperis kaj timis; kaj kiel ni ne povis diri al ni reciproke adiaŭ.“

„La kaleŝo veturas tra l' arbaĵo“, ekkriis Britain.

„Jes! Mi estas prota — kaj kiel ni malgraŭ ĉio feliĉe nin revidis; tiun ĉi tagon ni faros la plej feliĉa en la tuta jaro kaj ni ĝin festados kiel triobla tago de naskiĝo. Ne vere, mia kara?“

„Jes!“ diris la pli maljuna fratino kun fajro kaj radiant rideto. „Jes, Alfred, ne malrapidu. Ne restas tempo. Diru al Marion adiaŭ. Kaj Dio vin gardu!“

Li altiris la pli junan fratinnon al sia brusto. Kiam li ŝin ree ellasis, ŝi denove alvolvigis al Grace kaj denove ekrigardis al ŝi en la trankvilajn okulojn kun tiu sama rigardo plena je miksitaj sentoj.

„Adiaŭ, Alfred!“ diris la doktoro. „Paroli pri serioza korespondado aŭ serioza aldoniteco kaj ŝuldigeo kaj tiel plu en tiu ĉi — ha, ha, ha! — Vi scias, kion mi volas diri — pri tio ĉi paroli estus kompreneble malsaĝeco. Mi povas nur diri, ke se vi kaj Marion restos ĉe tiu ĉi sama malsaĝa stato de l' animo, mi kontraŭ Vi kiel bofilo, kiam la tempo venos, nenion kontraŭparolos.“

„Sur la ponto!“ ekkriis Britain.

„Ĝi venu!“ diris Alfred kaj kore skuis la manon al la doktoro. „Pensu iafajre pri mi, mia malnova amiko kaj zorganto, tiel serioze, kiel Vi nur povos! Adiaŭ, sinjoro Snitchey! Adiaŭ, sinjoro Craggs!“

„Ĝi venas jam!“ ekkriis Britain.

„Unu kison de Clemency Newcome pro malnova konateco — vian manon, Britain -- Marion, mia plej kara koro, adiaŭ! Fratino Grace, ne forgesu!“

La patrino figuro kaj la vizaĝo tiel bela en sia gaja trankvileco sin turnis al li; sed la okuloj de Marion ne povis sin deturni de ŝia fratino.

La kaleŝo estis antaŭ la pordo. La pakaĵo estis surmetita. La kaleŝo ekruliĝis for. Marion sin ne movis.

„Li faras al vi signon per la ĉapelo, mia kara“, diris Grace. „Via fianĉo, mia koro. Rigardu!“

La pli juna fratino suprenrigardis kaj turnis por sekundo la kapon. Sed kiam ŝi post tio ĉi renkontis la plenan rigardon de tiuj ĉi trankvilaj okuloj, ŝi plorante falis al la kolo al la pli maljuna fratino.

„Ho, Grace, Dio vin benu! sed mi ne povas ĝin rigardi, Grace! Ĝi rompas al mi la koron.“

Parto dua.

Snithey kaj Craggs havis belan malgrandan ekspedejon sur la malnova kampo de l' batalo, kie ili vivis de bela malgranda negoco kaj kondukadis multajn malgrandajn batalojn por multaj militantaj partioj. Kvankam oni propre ne povis diri, ke tiuj ĉi bataloj estus facilaj kaj vivaj bataloj de tiraljoroj — ĉar ordinare ili iradis tre malrapide kaj malfacile — oni tamen la partoprenon de la firmo en tiu rilato povis klasifiki sub tiu speco de skermado, ke ili jen ĵetadis pafon sur tiun ĉi plendanton, poste kuglon sur tiun defendanton, jen kun la tuta forto superfaladis sur teran proprajon starantan sub sekvestracio, kaj poste denove havis batalon kun neregula korpuso de malgrandaj ŝultantoj, ĝuste kiel estis la okazo kaj kiel la malamiko sin starigis kontraŭ ili. Por ili, tiel same kiel por homoj pli gloraj, la gazeto estis grava kaj tre interesanta folio; kaj pri la plejmulto de la bataloj, en kiuj ili montris sian militestran talenton, la batalantoj poste diradis, ke ili pro la multa fumo, de kiu ili estis ĉirkaŭataj, nur kun granda malfacilo povis reciproke sin rekoni kaj malfacile povis vidi, kion ili propre faras.

La ekspedejo de la sinjoro Snithey kaj Craggs kuŝis tre oportune sur la bazaro post malfermita pordo kaj du glataj malsupren kondukantaj ŝtupoj, tiel ke la kolera farmanto, kiu postulis proceson, kun la plej granda facileco povis ensalti. Siajn interparolojn ili havadis en posta ĉambro sur la unua etaĝo, kun malalta malluma plafono, kvazaŭ la ĉambro mem kuntiradis la brovojn en serioza meditado super komplikataj punktoj de leĝoj. La meblaro de la ĉambro konsistis el kelka nombro da ledaj seĝoj kun altaj apogiloj, kun grandaj rondaj najloj de flava kupro, el kiuj kelkaj elfalis aŭ eble estis eltiritaj de la senkonscia fingro de konfuzitaj klientoj. Ekster tio oni povis vidi gravuraĵon de unu glora juĝisto, kiu siatempe per ĉiu harligo de sia granda hararo faradis sur la homojn tian impreson, ke la haroj al ili starigadis kiel montoj. Paperoj en multaj apartaj amasoj plenigadis la polvajn ŝrankojn, bretojn kaj tablojn, kaj la malsupra parto de la muraj tabulaĵoj estis kovrita de vicoj da fajreltenaj kestoj kun pendantaj seruroj kaj kun dike skribitaj nomoj, kiujn la atendantaj klientoj per nevenkebla sorĉo sin sentadis devigataj silabadi de antaŭe kaj de poste, dum ili ŝajne aŭskultadis la sinjorojn Snithey kaj Craggs, ne komprenante eĉ unu vorton de tio, kion tiuj ĉi parolis.

Snithey kaj Craggs ambaŭ estis edzigitaj. Snithey kaj Craggs estis la plej bonaj amikoj en la mondo kaj havis reciproke efektivan konfidon; sed, kiel ofte okazas en la vivo, sinjorino Snithey el principo rigardadis sinjoron Craggs kun okuloj suspektemaj, kaj tion ĉi saman rilate la sinjoron Snithey faradis sinjorino Craggs. „Kun via Snithey“, iafoje diradis la lasta dirita sinjorino al sinjoro Craggs, „mi tute ne scias, kion vi volas kun via Snithey. Vi fidas tro multe vian Snithey, mi diras, kaj mi nur volus, ke vi neniam en alia maniero konvinkigu je tio ĉi.“ Reciproke sinjorino Snithey ripetadis al sia edzo, ke se li iam de iu estos kondukita sur malĝustan vojon, ĝi estos per tiu ĉi homo, kaj ke se iu havas malvereman okulon, ĝi estas Craggs. Malgraŭ tio ĉi ili tamen entute estis tre bonaj amikoj; kaj inter sinjorino Snithey kaj sinjorino Craggs estis malvasta ligo defenda kaj ataka kontraŭ la ekspedejo, kiu en iliaj okuloj estis ĉambro de suspektaĵoj kaj komuna malamiko plena je danĝeraj kaj misteraj mafinacioj.

Kaj tamen de tiu ĉi ekspedejo Snithey kaj Craggs ricevadis sian mielon. Tie ĉi ili staradis iafoje en belaj vesperoj apud la fenestro de ilia ĉambro de interparoloj, kiu eliradis sur la malnovan kampon de batalo, kaj miradis (sed ordinare nur kiam la ĵurintaj juĝantoj sidadis, la amasaj okupoj faradis ilin sentimentalaj) la malsagecon de la homoj, kiuj ne

povis ĉiam vivi inter si en paco kaj sian disputon trankvile fini en juĝejo. Tie ĉi tagoj, semajnoj, monatoj kaj jaroj pasadis super ili, kaj sole ilia ĵuĝa kalendara, la iom post iom pli malgrandiĝanta nombro de la kupraj najloj en la ledaj seĝoj kaj la kreskanta amaso de la paperoj sur la tablo atestadis tion ĉi. Tie ĉi preskaŭ tri jaroj, pasintaj de la tago de l' matenmanĝo en la ĝardeno, malmultigis la najlojn kaj multigis la amasojn da papero, kiam ili en unu vespero sidis kune en negoca interparolado.

Ili sidis ne solaj, sed kun unu viro de ĉirkaŭ tridek jaroj, malpene vestita kaj kun iom mallarĝa vizaĝo, sed entute bone konstruita, en bonaj vestoj kaj kun bela eksteraĵo. Li sidis sur la parada seĝo, tenante unu manon en la brusto de l' surtuto kaj la duan en la neordigitaj haroj, profundigita en malĝajan meditado. Snithey kaj Craggs sidis apude apud skribotablo unu kontraŭ la dua. Unu el la fajreltenaj kestoj staris malfermita sur la tablo; unu parto de ĝia enhavo kuŝis elmetita sur la tablo, dum la resto iradis tra la mano de sinjoro Snithey, kiu unu dokumenton post la alia tenadis apud la lumo, ĉiun paperon aparte ĉirkaŭrigardadis, balancante la kapon kaj transdonante ĝin al sinjoro Craggs, kiu ĝin ankaŭ ĉirkaŭrigardadis kaj balancadis la kapon. De tempo al tempo ili faradis paŭzon, balancadis ambaŭ la kapon kaj ekrigardadis sian en pensojn profundigitan klienton; kaj ĉar sur la kesto estis skribita „nobelo Michael Warden“, ni el ĉio tio ĉi povas konkludi, ke la nomo kaj la kesto apartenis al tiu ĉi kliento kaj ke la aferoj de nobelo Michael Warden staris ne tre bone.

„Jen estas ĉio“, diris sinjoro Snithey kaj metis la lastan paperon. „Mi vidas plu nenian helpon. Plu nenian helpon.“

„Ĉio perdita, malsparita, prodonita, pruntita kaj vendita?“ diris la kliento kaj suprenrigardis.

„Ĉio“, respondis sinjoro Snithey.

„Nenio restas por fari, Vi diras?“

„Absolute nenio“, estis la respondo de la advokato.

La kliento mordetis la ungojn kaj denove profundigis en sian meditado.

„Kaj eĉ mia persona libereco estas en danĝero, Vi pensas?“ li komencis post minuto denove.

„En ĉiu parto de la unuigitaj reĝolandoj Grand-Britanujo kaj Irlando“, respondis sinjoro Snithey.

„Sekve nur perdita filo, kiu povas pli reveni al nenia patro, ne havas porkojn por gardi kaj ne povas dividi kun ili la manĝon?“ daŭrigis la kliento, balancante unu piedon sur la dua kaj rigardante al la planko.

Sinjoro Snithey ektusis, kvazaŭ dezirante ne alpermesi la supozon, ke li partoprenas en ia alegoria prezentado de rajta rilato. Sinjoro Craggs ankaŭ ektusis, kvazaŭ volante montri, ke tio ĉi estas la opinio de la domo.

„Ruinigita en la aĝo de tridek jaroj“, diris la kliento. „Hm!“

„Ne ruinigita, sinjoro Warden“, respondis Snithey. „Tiel malbona la afero ankoraŭ ne estas. Vere, ke Vi faris ĉion, kion Vi povis, tion ĉi mi devas diri, sed Vi ne estas ruinigita. Iom da sinlimigado —“.

„Al la diablo kun la sinlimigado“, diris la kliento.

„Sinjoro Craggs, Vi permesos al mi preneton da tabako? Mi dankas.“

Kiam la trankvilanima advokato metis la preneton en la nazon, videble kun granda gusto kaj tute profundigita en la ĝuado, la vizaĝo de la kliento iom post iom glatiĝis, kaj ridetante li diris:

„Vi parolas pri sinlimigado. Kiel longe?“

„Kiel longe?“ ripetis Snithey, enflante la tabakon de la fingroj kaj ŝajnante kalkuli en pensoj; „en bonaj manoj — ni parolas en la nomo de Snithey kaj Craggs — ses aŭ sep jarojn.“

„Ses aŭ sep jarojn ne manĝi!“ diris la kliento kun ĉagrena rido kaj senpacience movante sin sur la seĝo.

„Ses aŭ sep jarojn ne manĝi, sinjoro Warden, estus efektive io neordinara“, diris Snitchey. „En la daŭro de tiu ĉi tempo Vi povus sole per montrado sin jam perlabori novan teraĵon. Sed ni ne pensas, ke Vi povus ĝin fari, kaj tial ni ĝin ankaŭ ne konsilas al Vi.“

„Kion do Vi al mi konsilas?“

„Sinlimigadon“, ripetis Snitchey. „Kelkaj jaroj da sinlimigado sub nia observado denove liberigus Vian proprajaĵon. Sed en tiu okazo Vi devus vivi en la eksterlando. Kaj tuŝante la nemangadon, ni povas al Vi eĉ nun jam donadi kelkajn centojn da funtoj da sterlingoj ĉiujare, sinjoro Warden.“

„Kelkajn centojn da funtoj?“ diris la kliento. „Kaj mi foruzadis milojn!“

„Tion ĉi“, respondis sinjoro Snitchey, garde remetante la paperojn en la feran keston, „tion ĉi oni tute ne povas dubi. Oni tute ne povas dubi“, ripetis li malrapide, daŭrigante medite sian okupon.

La advokato tre kredeble konis bone la homon, kun kiu li havas aferon; en ĉia okazo lia seka kaj komika maniero de agado havis bonan influon sur la ĉagrenon de la kliento kaj inklinigis lin esti malkovrita kaj pli parolema. Aŭ eble la kliento konis la karakteron de sia interparolanto kaj nur ellogis la kuraĝigajn proponojn por povi pli bone defendi unu planon, kiun li volis malkovri. Li levis nun iom post iom la kapon kaj rigardis siajn trankvilanimajn konsilantojn kun rideto, el kiu baldaŭ fariĝis rido.

„En la vero, mia estimata amiko“ — sinjoro Snitchey montris sur sian kompanion: „Snitchey kaj, pardonu, kaj Craggs.“

„Mi petas sinjoron Craggs pardonu al mi“, diris la kliento. „En la vero, miaj estimataj amikoj“, — li klinigis sin antaŭen kaj mallaŭtigis la voĉon — „ankoraŭ vi tute ne scias, kiel malbone estas al mi.“

Sinjoro Snitchey ekrigardis lin tute mirigite kaj timigite. Sinjoro Craggs mezuris lin per tia sama rigardo.

„Mi estas ne sole terure enŝuldigita“, diris la kliento, „sed ankaŭ terure —“.

„Ja ne enamita?“ ekkriis Snitchey.

„Jes!“ diris la kliento, reĵetante sin sur la seĝon kaj kun la manoj en la poŝoj rigardante la ambaŭ advokatojn. „Terure enamita.“

„Kaj ne en heredantaron?“ demandis Snitchey.

„Ne en heredantaron.“

„Kaj ankaŭ ne en riĉan sinjoraron?“ daŭrigis demandadi la advokato.

„Ne riĉa, kiom mi scias — esceptinte je beleco kaj virto.“

„Sinjorino ne edzinigita, mi esperas?“ diris sinjoro Snitchey kun akcento.

„Kompreneble!“

„Ne en unu el la filinoj de doktoro Jeddler?“ diris Snitchey, metinte la kubutojn sur la genuojn kaj antaŭŝovinte sian vizaĝon almenaŭ je unu ulno.

„Tamen!“ respondis la kliento.

„Ne en sian pli junan filinon?“ demandis Snitchey.

„Tiel estas!“ estis la respondo de sinjoro Warden.

„Sinjoro Craggs“, diris Snitchey tre faciligite, „Vi permesos al mi preneton da tabako? Mi dankas. Mi ĝojas, ke mi povas diri al Vi, sinjoro Warden, ke tio ĉi neniam malutilas; ŝi estas promesita, sinjoro, ŝi estas financino. Mia kompaniano povas tion ĉi atesti. Ni scias tion ĉi bone.“

„Ni scias tion ĉi bone“, ripetis Craggs.

„Mi eble ankaŭ scias“, estis la respondo de la kliento. „Kion tio ĉi malhelpas? Vi diras, ke Vi estas spertaj homoj, kaj Vi neniam aŭdis, ke virino ŝanĝis sian opinion?“

„Okazis, vere, plendoj pri rompo de edziga promeso“, diris sinjoro Snitchey, „kontraŭ fraŭlinoj, kiel ankaŭ kontraŭ vidvinoj, sed en la plejmulto da okazoj —“.

„Okazoj!“ interrompis lin senpacience la kliento. „Parolu al mi nenion pri okazoj. La vivo estas libro multe pli granda kaj pli riĉa je enhavo ol Viaj juraj artifikoj. Kaj ekster tio ĉu Vi pensas, ke mi vane loĝis ses semajnojn en la domo de la doktoro?“

„Mi pensas, sinjoro“, diris sinjoro Snitchey kaj turnis sin serioze al sia kompaniano, „mi pensas, ke el ĉiuj petolajoj, kiujn al sinjoro Warden faris liaj ĉevaloj — kaj ili estis sufiĉe multaj kaj sufiĉe karaj, kiel li kaj ni ambaŭ la plej bone scias — la plej malbona estis tiu, ke unu el ili lasis lin kun tri rompitaĵoj, elartikigita ŝultro kaj Dio scias kiom da subsangaĵoj antaŭ la muro de l' ĝardeno de la doktoro. Tiam, vidante lin resaniĝanta sub la flego kaj tegmento de la doktoro, ni ne antaŭvidis tian malbonaĵon; sed estas tre malbone, sinjoro, malbone! Estas tre malbone. Kaj doktoro Jeddler — nia kliento, sinjoro Craggs.“

„Kaj sinjoro Alfred Heathfield — ankaŭ speco de kliento, sinjoro Snitchey“, diris sinjoro Craggs.

„Kaj sinjoro Michael Warden, ankaŭ speco de kliento“, trankvile aldonis la gasto, „kaj ne malbona, ĉar li dek aŭ dekdu jarojn vivis facilanime. Sed Michael Warden nun moderigis sian varmegon; tie en la kesto kuŝas la fruktoj kaj ankaŭ rimedoj por penti kaj fariĝi pli prudenta. Kaj por tion ĉi pruvi, sinjoro Warden volas, se li povas, edziĝi je Marion, la aminda filino de la doktoro, kaj preni ŝin kun si.“

„Efektive, sinjoro Craggs?“ komencis Snitchey.

„Efektive, sinjoro Snitchey kaj sinjoro Craggs“ interrompis ilin la kliento. „Vi konas Viajn ŝuldojn rilade Vian klienton, kaj Vi scias ankaŭ certe, ke Vi ne estas necesigitaj miksi Vin en simplan aman aferon, kiun mi devas konfidi al Vi. Mi ne volas forkonduki la junan sinjorinon sen ŝia konsento. En la afero estas nenio kontraŭleĝa. Mi neniam estis intima amiko de sinjoro Heathfield. Je nenia perfido kontraŭ li mi faras min kulpata. Mi amas, kiel li amas, kaj se mi povos, mi intencas gajni tion, kion li volis gajni.“

„Li ne povos, sinjoro Craggs“, diris Snitchey, videble tre maltrankvile. „Ĝi ne povas al li prosperi, sinjoro. Ŝi estas tre alligita al sinjoro Alfred.“

„Efektive?“ diris la kliento.

„Sinjoro Craggs, ŝi estas tre alligita al li“, certigis Snitchey.

„Ne vane mi ses semajnojn pasigis en la domo de la doktoro; kaj baldaŭ mi komencis tion ĉi dubi“, diris sinjoro Warden. „Ŝi amus lin, se ĉio irus laŭ la volo de ŝia fratino, sed mi ŝin observis. Marion evitadis lin nomi kaj paroli pri li, kaj ĉe la plej malgranda aludo je li ŝi videble suferadis.“

„Kial ŝi devus tiel agadi, sinjoro Craggs? kio ŝin igus, sinjoro?“ demandis Snitchey.

„Kial — mi ne scias, kvankam ekzistas multaj cirkonstancoj, kiuj povas ĝin komprenigi“, diris la kliento kun rideto pro la streĉo kaj konfuzo, kiuj esprimiĝis en la vizaĝo de Snitchey, kaj pro la singarda maniero, en kiu li parolis pri la afero kaj penis sciigi pli multe; „sed mi scias, ke tiel estas. Ŝi estis tre juna, kiam ŝi fianĉiĝis — se oni entute tiel provas tion ĉi nomi — kaj eble ŝi ĝin pentis. Eble — ĝi sonas fanfarone, sed mi certigas, ke tia ne estas mia intenco — eble ŝi enamiĝis en min, kiel mi enamiĝis en ŝin.“

„He, he! sinjoro Alfred, ŝia malnova kolego de ludoj,

sinjoro Craggs“, diris Snithey kun embarasa rido, „jam konis ŝin ja kiel tre malgranda infano“!

„Tiom pli kredeble estas, ke tediĝis al ŝi pensi pri li“, trankvile daŭrigis la kliento, „kaj ke ŝi ne malvolonte ŝanĝus lin je nova amanto, kiu venas al ŝiaj okuloj sub romanaj cirkonstancoj — aŭ estas alportata antaŭ ŝiajn okulojn de sia ĉevalo; kiu havas la renomon, ne senallogan por knabino provinca, de homo, kiu vivis facilanime kaj diboĉe kaj al neniu faris ion malbonan; kaj kiu per sia eksterajo — ĝi denove sonos fanfarone, sed, pro l' honoro, mi tiel ne pensas — povos ankoraŭ elteni la konkuron kun sinjoro Alfred“.

La lastan oni certe ne povus nei; kaj sinjoro Snithey, rigardante sian klienton, ankaŭ tiel pensis. Ĝuste lia malsata sintenado donadis al li certan naturan ĉarmon kaj elvokadis intereson. Tiu ĉi malsateco ŝajnis esprimadi, ke lia bela vizaĝo kaj lia bone konstruita figuro povus esti multe pli bonaj se li nur volus; kaj ke se li iam sin levos kaj fariĝos serioza (sed ĝis nun li ankoraŭ neniam en sia vivo estis serioza), li povus esti plena je fajra energio. „Tio ĉi estas danĝera diboĉisto“, diris al ŝi la homokonanta advokato, „kiu la vivigan fajron, mankantan al li, ŝajnas ricevadi el la okuloj de knabino“.

„Sekve aŭskultu, Snithey“, li daŭrigis, sin levante kaj prenante lin per unu butono, „kaj Vi, Craggs —“ li prenis lin ankaŭ per butono kaj starigis unu dekstren kaj la duan maldekstren apud si, tiel ke ili ne povis forkuri de li — „mi ne demandas de Vi konsilon. Vi faras tre prave, ke Vi tenas Vin de tiu ĉi afero senkondiĉe tute malproksime, ĉar ĝi ne estas de tia speco, ke seriozaj homoj, kiel Vi, povus sin enmiksi en ĝin. Mi volas nur per malmultaj vortoj prezenti mian situacion kaj miajn intencojn kaj poste lasi al Vi fari por mi rilate miajn aferojn monajn ĉion plej bone kion Vi nur povas, ĉar Vi komprenas, se mi nun forkuros kun la bela filino de la doktoro (kaj mi esperas tion ĉi fari kaj fariĝi per ŝia amo alia homo), tio ĉi por la unua minuto estos pli multekosta, ol se mi sola forkurus.“

(Daŭrigo venos.)

Korespondoj.

Aleksandrovska, 26/III 91.

Estimata Sinjoro! La unuajn 25 ekzemplerojn de la lernolibro kun du vortaroj por rusoj mi disdonis tie ĉi kaj la lastan sendaĵon de 25 ekzempleroj mi sendis per la ingeniero sinjoro H. Jekaterinoslavon al la librejo de sinjoro S., lin petante (en la lingvo Esperanto) ĝin akcepti de mi senpage, vendi la libretojn kaj venigi de Vi pli da libroj pri nia lingvo, tial ke li ĉiam ilin havu en provizo. — Sentante la devon fari ankoraŭ ion por la devastigado de nia bona afero, mi deziras presigi la almetitan anoncon en ia multe legata rusa gazeto. Se Vi aprobas mian intencon, mi petas Vin trarigardi, plibonigi aŭ tute alligi la anoncon laŭ Via gusto kaj resendi ĝin al mi; tiam mi ĝin reskribos kaj kun la necesa mono sendos al tiu redakcio, kiun Vi proponos, petante la redakcion elsendi al mi la unuan numeron, en kiu estos la anonco. (Rimarko de la redakcio. La anonco devis enhavi sciigon pri la poŝta lernolibro kaj nian adreson; sed ni konsilis al la estimata korespondanto pli bone doni sian propran adreson.) Ricevu koran saluton de Via

C. Hübert.

Volčinec, ĉe Bričani, en Marto 1891.

La personoj, kiuj sin interesas je la literaturo esperanta, facile rimarkos, ke preskaŭ ĉiu nova libro, ĉiu nova artikolo en la gazeto kaj ĉiu nova versaĵo alportas novajn radikvortojn. Komprenable neniu protestos pro tio ĉi, se la novkondukita vorto estas esence bezona, se estas neeble aŭ tre neoportune

kunmeti tiun ĉi vorton el la radikvortoj, kiujn ni jam havas. Sed se la nova radikvorto estas superflua, se oni povas kunmeti ĝin el la radikvortoj, kiujn ni jam posedas, aŭ se ni jam havas radikvorton de tia sama signifo, tiam, laŭ mia opinio, la nova radikvorto fariĝas ne sole senutila, sed ankaŭ malutila.

Efektive, unu el la plej gravaj celoj de ĉia nun eldonata esperanta verko konsistas en tio, ke la legantoj kaj lernantoj konatigu kaj kutimigu je la kunmetitaj esperantaj vortoj kaj ke ili proprigu al si la signifon kaj sencon de la radikvortoj. Ŝarĝi la memoron de l' lernanto per senbezonaĵoj vortoj estas efektiva krimo, ĉar ĉian fojon, kiam la lernanto renkontas novan vorton, kiu malestas en la vortaro, li perdas la kuraĝon, li konkludas, ke oni lin trompis, dirinte, ke la tuta vortaro de la ordinara vivo enhaviĝas, ekzemple, en la meza vortaro internacia-germana. Mi konfesas, ke la poezio gajnas iom per novaj vortoj, sed laŭ mia konsidero lingvo internacia estas antaŭ ĉio lingvo scienca kaj komerca. La bezonoj de la poezio okupas nur la trian vicon inter la aliaj bezonoj.

Tial mi volus proponi al la amikoj de la lingvo, ke ili sin detenu de la uzado de novaj senbezonaĵoj radikvortoj kaj ke en okazo, se la bezono je ia radikvorto estas nevenkebla, ili aldonu ankaŭ la signifon de tiu ĉi nova vorto per la malnovaj esperantaj radikvortoj, kio estas tute obla, ĉar ni jam scias tre bone, ke la lingvo Esperanto estas sufiĉe riĉa kaj esprimanta en la buŝo kaj mano de bona majstro.

S. Ŝatunovski.

Nürnberg', dato de la poŝta stampo.

Al niaj amikoj kaj membroj.

En la gazeto „La Esperantisto“ Vi legis ke la „Internacia Klubo de Korespondado en Nürnberg“ estis fondita en la monato Januaro de kuranta jaro. — Jam multaj amikoj de la lingvo Esperanto aliĝis al nia klubo, kaj ni esperas, ke (se Vi ne estas jam membro) Vi certe ankaŭ fariĝos volonte membro de ĝi.

Nur je tiu-ĉi maniero, ke ĉia vera amiko de nia afero donos sian helpan manon al l' alia amiko, ni povas atingi la deziritan celon. — Se Vi volas plenumi nian deziron, tiam Vi nur bezonas transsendi al la klubestro, sinjoro Friedrich Ebersberger, Nürnberg, Hübnersplatz 1, Vian detalan adreson kun la promeso, ke Vi volos korespondadi kun la membroj de tiu-ĉi klubo.

La propagando por nia utila afero postulas nature grandajn sumojn da mono, kiujn ni esperas ricevi de niaj membroj. Sed ili ne bezonas sendi al ni efektivan monon; ni estos jam kontentaj, se Vi faros la malgrandan servadon kolekti uzitajn signojn de poŝto kaj poŝtokartojn de Vialando kaj transsendi ilin al sinjoro Ebersberger kiel modeloj sen valoro.

Nia modesta deziro certe estos plenumata de ĉiuj fidelaj adeptoj de l' lingvo internacia Esperanto, ĉar ĉiu povas ricevi tre facile ilin en granda multego de komercistoj kaj oficistoj. — La ricevotaj poŝtosignoj estos objektoj de komerco kaj kiel tiaj ili alportos monon por la vastigado de nia lingvo.

Tial, amikoj, alportu la malgrandan oferon al nia afero, memorante la proverbon: „Per malgrandaĵo oni povas atingi grandaĵon.“ Kaj ni atingos ĝin, se ĉiuj niaj amikoj subtenas nian entreprenon.

En tiu-ĉi espero ni kore salutas Vin kaj subskribas kun alta estimo

La prezidantaro de l'
Internacia Klubo de Korespondado
de la Societo Merkur en Nürnberg:

Chr. Schmidt.

Ebersberger. Hans Schmidt.

Novajoj.

Por la celoj de nia afero L. Zamenhof ricevis: de sinjoro A. Naumann el Vilno — 5 rublojn; de sinjorino N. N. el Zlatopol — 3 rublojn; per la kolekto de sinjoro I. Pučkovski el Kjaŝta: de sinjoro Kojranski — 5 rublojn, de sinjoro Styjnyĥ — 3 rublojn, de sinjoro Galanin — 1 rublon, de sinjoro Pučkovski 20 kop., de sinjoro Savicki — 20 kop., de sinjoro Milčevski — 20 kop., de sinjoro Poljakov — 20 kop., de sinjorino Čerepanov — 20 kop. Kune 18 rublojn. — Kune kun la antaŭe ricevita ĝi faras 57 rublojn 8 kop. — La tutan monon kolektitan ĝis hodiaŭ ni uzis por senpaga dissendo de poŝaj lernolibroj (ni dissendis en la lasta tempo ĉirkaŭ 1000 ekzemplerojn al ĉiuj rusaj viraj kaj virinaj gimnazioj, progimnazioj, realaj lernejoj, seminarioj kaj regimentoj).

Lernolibrojn (ne malpli ol 10) aŭ vortaretojn (ne malpli ol 100) en la lasta tempo venigis (aparte aŭ inter aliaj verkoj) la sekvantaj personoj: sinjoro N. Mitrofanov el Tzarskoje Selo — 35/41; sinjoro K. Portav el Bikovo (gub. Astraĥan) — 25/41; sinjoro L. Azémar el Tuluzo (Francujo) — 10/3 + 1/15; sinjoro S. Ŝatunovski el Volčince (gub. Besaraba) — 25/41 + 10/1; sinjoro G. Miĥajlov el Melekes (gub. Samara) — 10/41; sinjoro A. Naumann el Vilno — 1/3 + 4/4 + 7/41 + 1 libro de Meier; sinjoro I. Pučkovski el Kjaŝta — 38/41; sinjoro Guminski el Rovnoje (gub. Samara) por sinjorino S. Vogau — 50/41; sinjoro L. de Beaufront el St. Sulpice — 10/8; sinjoro V. Ŝmurlo el St. Peterburgo — 25/41 + 3/1; sinjoro G. Romanski el Odeso — 50/41 + 6/1.

En la lasta tempo la sekvantaj gazetoj parolis pri nia afero: „Kurjer codzienny“ No. 82 (pri la verko de Grabowski kaj pri la rondeto Esperantista en S. Peterburgo); „Russkaja Mysl“ No. 2 (artikolo pri nia lingvo); „Nauka i Ĵiznj“ No. 11 (traduko de la Fingra Kalendaro el la „Esperantisto“ (de sinjoro N. Raspopov el St. Aleksandrovskaĵa) kaj artikoleto pri nia lingvo); „Le Nouvelliste du Tarn“ No. 3363 (artikolo de sinjoro de Beaufront pri nia lingvo); „Münchener Neueste Nachrichten“ No. 141 (pri la publika parolado de sinjoro Meier); „Odesski Listok“ No. 66 (pri la rondeto Esperantista en S. Peterburgo); „Vilenski Vjestnik“ No. 75 (traduko de la „Deveno de la virino“ el la „Esperantisto“ kun artikoleto pri nia lingvo — de sinjoro J. Lojko); „Kurjer Codzienny“ No. 107 (traduko de la „Deveno de la virino“ el la „Esperantisto“). — Al sinjoroj Riĵkov, Raspopov, Hiŭbert, de Beaufront, Meier, Ŝatunovski kaj Lojko, kiuj aliŝindis al ni la diritajn gazetojn, ni esprimas nian koran dankon.

Sinjoro V. Kravcov el Boguĉar komencis la presadon de sia broŝuro (en lingvo rusa) pri nia afero, sub la titolo „Vsemirnoje djelo“ (Tutmonda afero). La aŭtoro intencas dissendi la tutan eldonon (1000 ekzempleroj) senpage al piversaj personoj.

Post kelkaj tagoj eliros la poŝa lernolibro de nia lingvo por germanoj (analoge je la rusa libro No. 41). Pli detale ni parolos pri tiu ĉi libro, kiam ĝi estos elirinta. Tie ĉi ni nur diros, ke la zorgon pri la eldono kaj ankaŭ la tutan materialan flankon de la eldono prenis sur sin la varma kaj oferema amiko de nia afero, sinjoro W. H. Trompeter, kaj alportis per tio ĉi al nia afero tre gravan servon. Post kelkaj tagoj oni povos ricevi tiun ĉi verkon ĉe la presejo de W. Tümmel en Nurnbergo kaj post kelkaj semajnoj ankaŭ ĉe ni. La kosto de ekzemplero estos 20 pfenigoj (= 10 kopekoj).

La 13an de Marto sinjoro L. Meier havis publikan paroladon pri nia lingvo en la societo komercista „Merkur“ en Munĥeno. La rezultato de tiu ĉi parolado estis, ke oni decidis baldaŭ komenci instruan kurson de nia lingvo en tiu ĉi societo.

En la fino de Marto sinjoro Chr. Schmidt havis publikan paroladon pri nia lingvo en la societo de germanaj komercistoj en Fürth.

Personoj dezirantaj korespondadi en Esperanto.

S. A. Lundström, Johannesgat. 11	Upsala (Svedujo).
V. Langlet, fil. stud., Sysslomansgat. 3	" "
J. Fredbärj, fil. stud. Drottninggat. 1	" "
V. Valde, fil. stud., N. Skolgat 7.	" "
J. Norrby, teol. stud., Johannesgat. 11	" "
O. V. Vennersten, fil. stud., Klostergat. 3	" "
L. Smedberg, fil. stud., Jernbrogat. 10	" "
K. Bergström, fil. stud., Johannesgat. 7	" "
E. Tham, fil. kand., Klostergat. 14.	" "
V. N. Riĵkov, Velikie-Luki, gub. Pskov (Rusujo).	
R. Geoghegan, East-Sound, San Juan Co., Wash. U. S.	(Ameriko).
T. Geoghegan (sinjorino), East-Sound, San Juan Co., Wash. U. S.	(Ameriko).
N. Kuŝnir, Toplik, gub. Podolsk (Rusujo).	
X. Popov, Ternovo, Dolna-Ŭrechovitza (Bulgarujo).	
A. G. Naumann, strato Polotzkaja, domo de la grafo Morikoni, Vilno (Rusujo).	
Vladimir Smurlo, Čelabinsk, gub. Orenburg (Rusujo).	
Karl Baumeister, komercisto, obere Kanalstr. 24, Nürnberg.	
Maks Ruppert, " Austrasse 13,	"
Ernst Elbl, " Gibitzenhofstr. 8/I,	"
Siegfried Oettinger, " Brunnengasse 21,	"
Hermann Rehlen, " Irerstr. (Rotes Ross),	"
Robert Rosauer, " Hallplatz 11,	"
Alexander Ebert, " bei Hesslein & Comp.	"
Georg Dumpert, " Königsstrasse 53,	"
Hans Schmid, " Albrecht-Dürerstr. 4,	"
Franz Schmidt, " Wurzelbauerstr. 24/III,	"
Sofia Guber, instruistino, Rotschmiedsgasse 8,	"
Friedrich Schmidt, Gimnazisto, Spittlerthorgraben 33	"
Hans Wagner, komercisto, Karlsstrasse 19,	"

Facila regulo por multoblige parkere nombrojn kunmetitajn el tutaj kaj duonoj.

Proponita de J. Grohn.

Se ni bezonas multoblige inter si du nombrojn partumajn, el kiuj ĉiu enhavas nombron tutan kaj duonon, ni povas, anstataŭ la komplikita ordinare uzata skriba maniero, fari ĝin facile parkere per la sekvanta regulo, kiun ni proponas: ni devas la duonon de la pli malgranda nombro aldoni al la nombro pli granda, multoblige inter si la tiel ricevita nombrojn tutajn, al la rezultato aldoni duonon de la diferenco inter la du tutaj nombroj kaj ankoraŭ unu kvaronon.

Ekzemploj:

$$8\frac{1}{2} \times 4\frac{1}{2} = 9 \times 4 + 2 + \frac{1}{4} = 38\frac{1}{4};$$

$$2\frac{1}{2} \times 9\frac{1}{2} = 2 \times 10 + 3\frac{1}{2} + \frac{1}{4} = 23\frac{3}{4};$$

$$6\frac{1}{2} \times 6\frac{1}{2} = 6 \times 7 + 0 + \frac{1}{4} = 42\frac{1}{4}.$$

Anoncoj.

Nomaro

de l' verkoj pri la lingvo internacia Esperanto,
kiuj eliris ĝis Majo 1891.

- | № | Nomo de l' verko: | Kosto: |
|-----|---|------------|
| 1. | D-ro Esperanto. Mejdunarodni Jazik. Predislovie i Polni Učebnik. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono rusa) | 15 kopekoj |
| 2. | — Język Miedzynarodowy. Przedmowa i Podrecznik Kompletny. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono pola) | 15 kop. |
| 3. | — Langue Internationale. Préface et Manuel Complet. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono franca) | 20 kop. |
| 4. | — Internationale Sprache. Vorrede und Vollständiges Lehrbuch (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono germana) | 20 kop. |
| 5. | R. Geoghegan. Dr. Esperanto's International Language. Introduction and Complete Grammar. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono angla) | 20 kop. |
| 6. | D-ro Esperanto. Malgranda vortaro de la lingvo Esperanto (kun antaŭparolo) por Rusoj | 3 kop. |
| 7. | — por Poloj | 3 kop. |
| 8. | — por Francoj | 3 kop. |
| 9. | — por Germanoj | 3 kop. |
| 10. | — por Angloj | 3 kop. |
| 11. | D-ro Esperanto. Dua Libro de l' Lingvo Internacia (verkita en la lingvo Esperanto) | 25 kop. |
| 12. | D-ro Esperanto. Aldono al la Dua Libro de l' Lingvo Internacia (en Esperanto) | 10 kop. |
| 13. | Hanez. Safah achath lekulanu (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea) | 20 kop. |
| 14. | A. Grabowski. La Neĝa Blovado. Rakonto de Puŝkin (en Esperanto) | 15 kop. |
| 15. | L. Einstein. La Lingvo Internacia als beste Lösung des internationalen Weltsprache-Problems. Vorwort, Grammatik und Styl nebst Stammwörter-Verzeichniss nach dem Entwurf des pseudonymen Dr. Esperanto | 50 kop. |
| 16. | N. N. Rusa traduko de la „Dua Libro de l' Lingvo Internacia“ | 25 kop. |
| 17. | D-ro Esperanto. Plena vortaro rusa-internacia | 1 rublo. |
| 18. | N. N. Rusa traduko de la „Aldono al la Dua Libro“ | 10 kop. |
| 19. | A. Grabowski. La Gefratoj. Komedio de Göthe (en Esperanto) | 15 kop. |
| 20. | L. Einstein. Weltsprachliche Zeit- und Streitfragen. Volapük und Lingvo Internacia | 25 kop. |
| 21. | D-ro Esperanto. Meza vortaro internacia germana | 25 kop. |
| 22. | Henry Phillips, Jr. An Attempt towards an International Language by Dr. Esperanto translated by Henry Phillips Jr., a secretary of the American Philosophical Society. Together with an english-international vocabulary compiled by the translator | 50 kop. |
| 23. | Hanez. Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea-germana | 20 kop. |
| 24. | G. Henriclundquist. Dr. Esperanto's Internationalt Sprach (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono sveda) | 20 kop. |
| 25. | A. Demonget. Internacia ou Volapük? par Léopold Einstein, traduction de Auguste Demonget | 25 kop. |
| 26. | E. de Wahl. Vortaro Esperanto-hispana | 3 kop. |
| 27. | G. Henriclundquist. Vortaro Esperanto sveda | 3 kop. |

- | | | |
|-----|--|---------|
| 28. | Klubo Nurnberga. La Lingvo Internacia. Vollständiger Lehrgang der internationalen Sprache nebst Wörterbuch zum Gebrauche für Deutsche. Herausgegeben vom Nürnberger Weltsprache-Verein | 25 kop. |
| 29. | R. Libek. Starptautiska Valoda (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono latva) (Lettisch) | 60 kop. |
| 30. | Kolekto da novaj verkoj (en Esperanto), kajero No. 1 | 25 kop. |
| 31. | Adresaro de la Esperantistoj, kajero No. 1 | 10 kop. |
| 32. | Marietta Frollo. Vortareto Esperanto-rumana | 3 kop. |
| 33. | Chr. Nielsen. Laerebog til det internationale Esperantosprog. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono dana) | 25 kop. |
| 34. | M. S. Bogdanov. Pulen učebnik za svetski ut jezik. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bulgara) | 50 kop. |
| 35. | Dr. D. Marignoni. Esperanto ossia la piu pratica delle lingue internazionali. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono itala) | 25 kop. |
| 36. | J. Rodriguez Huertas. Gramática de la Lingvo Internacia del Doctor Esperanto. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hispana) | 20 kop. |
| 37. | A. Grabowski. Kondukanto internacia de l' interparolado kun modeloj de leteroj (en Esperanto) | 30 kop. |
| 38. | A. Zinovjev. Mejdunarodni jazik „Esperanto“ (la tuta eldono estis senpage dissendita) | |
| 39. | Fr. Vl. Lorenc. Uplna učebnice mezinardni reči dra. Esperanta (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bohema) | 25 kop. |
| 40. | D. Gurevič. Sefer hamilim Esperantis (Vortareto hebrea-esperanta) | 20 kop. |
| 41. | L. Zamenhof. Vsemirni jazik Esperanto. Polni učebnik s 2 slovarjami (Poŝa lernolibro de la lingvo Esperanto por Rusoj) | 10 kop. |
| — | Ludwig Meier. La Lingvo Internacia Esperanto. Vollständige methodische Grammatik, Formenlehre und Syntax der internationalen Sprache Esperanto | 60 kop. |
| — | Wörterbuch der internationalen Esperanto-Sprache. Deutsch-internationaler Teil. Meza vortaro germana-internacia | 25 kop. |
| — | V. V. de Majnov. Renaskita Manfred, dramo en tri aktoj, de K. R. | 25 kop. |
| — | A. Grabowski. La Nova Jaro, de Boleslaw Prus. Janko Muzikanto, de H. Sienkiewicz | 20 kop. |
| — | A. Dombrovski. Lingvo internacia de Dro Esperanto, eldono litova. Mokintuve terptautizkos kalbos Dro Esperanto | 15 kop. |

Wörterbuch der internationalen Esperanto-Sprache.

Deutsch-international.

Meza vortaro germana internacia povas esti ricevata de la presejo de **W. Tümmel, Nürnberg.**

... Kosto 50 pfenigoj. ...